
# ?inio memorigas la usonan ka?itan programon PRISM




Pekino, dec 24 (RHK) La ?ina registaro rifuzis akuzojn de du usonaj senatanoj pri tio ke ?i ser?as profiti el milionula projekto de submara kablo en la Pacifiko por spioni aliajn landojn.

Komentinte leteron skribitan de la senatanoj respublikanaj Marco Rubio kaj Ted Cruz, kiu avertas pri la rolo de Pekino en la projekto, rivelita de la informagentejo Reuters, la parolisto de la ekstera ministerio ?ina, Zhao Lijian, asertis ke la akuzo estas “kompleta kalumnio” desegnita por “pravigi la demeton frenezan de Usono kontra? ?inaj entreprenoj de alta teknologio”.

“Tiuj senatanoj opozicios al ?io farota de ?inio. ?iam inventas mensogojn por misfamigi ?inion celante politikajn profitojn. Ili ne havas politikan integrecon, asertis Zhao dum gazetara konferenco.

Krome, Zhao memorigis la klopodojn de cifereca spionado de Va?ingtono je monda nivelo, kaj citis la ka?itan programon de elektronika gvatado PRISM de la Agentejo de Nacia Sekureco (NSA).

“Estas Usono kiu efektivigis cibernetikajn ?telojn amasajn tra la mondo, e? kontra? sia propraj aliancitoj, de kiam aperis PRISM. Estas vera imperio de 'hackeo´ kaj ?telado”.

La letero de la senatanoj, sendita al la registaro de la federaciaj ?tatoj de Mikronezio (FSM) en septembro, asertis ke Pekino uzus la projekton de submara kablo de 72,6 milionoj da dolaroj por ekigi “kampanjon de spionado kaj geopolitika premo” en la Pacifiko kaj instigas la funkciulojn de tiu lando rifuzi la  ?inan partoprenon.

La letero devenas al premo de Va?ingtono dum la somero, kiam usonaj funkciuloj sendis diplomatian noton a FSM esprimante “strategiajn zorgojn” post kiam la ?ina kompanio Huawei Marine prezentis oferton por la kablo-projekto, la? informas Reuters.

La submara kablo estas desegnita por plibonigi la komunikojn kun FSM, Kiribati kaj Nauru, insuloj de la Pacifiko, kaj estas subtenata de la Monda Banko kaj la Azia Banko de Evoluigo.

Tamen, la projekto estas haltigita dum la lastaj semajnoj meze de pritaksa etapo de ofertoj, kio lasis ?ian estontecon de limbo dum kelkaj firmaoj internaciaj konkuras por la kontrakto. Krome Huawei, la japana NEC Corporation kaj Alcatel Submarine Network, filio de la finna Nokia, anta? prezentis ofertojn.

Fonto: RT

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/242979-cinio-memorigas-la-usonan-kasitan-programon-prism

Radio Habana Cuba